

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ

Aperas monate. Jara abono K 12.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Pošta ŝparkaso no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

B. TITTL:

LA UNUA BALOTO EN ĈEĤOSLOVAKIO.

La unuaj balotoj en la ĉeĥoslovakana parlamenton kaj senaton alportis kelkajn surprizojn al eksterlandaj observantoj de la politika vivo en Ĉeĥoslovakio, kiuj kaŭzis multajn konsiderojn de fremdlandaj gazetoj. Fremdulo pretervole demandas, ĉu la rezultato de la balotoj efektive akordiĝas kun la nacieca konvinko de la Bohemoj, ĉiam tiom fieraj je sia nacieco, rifuzantaj kiu ajn kompromison kun la Germanoj, kun kiuj ili vivis en la sama ŝtato kaj de ili estis regataj.

Dum la lastaj dekjaroj, ĉefe dum la mondmilito, la Bohemoj prezentigis unuflanke kiel nacio evidente patriota, aliflanke kiel nacio pligrandparte kontraŭeklezia, tiel ke oni povis atendi, ke la rezultato de la unuaj balotoj de la memstara Ĉeĥoslovakio konformiĝos al ilia spirito. Kaj tamen la rezultato de la skrutinio anoncas ion tute alian: la partioj patriotaj ricevis proporcie malgrandan kvanton da voĉoj, dume la internacia sociala demokratio estas la plej forta ĉeĥoslovaka partio kaj ankaŭ le klerikala »popola partio« povas fieriĝi per sia plifortiĝo kompare kun la lastaj komunumaj balotoj.

Ĉu tio eble signifas bankroton de la nacieca konscio kaj samtempe revenon al la katolikismo? Trompus sin tiu, kiu juĝus tiel. La rezultato de la balotoj estas kaŭzo de io alia: la Bohemoj akiris sian memstaron, fariĝis estroj de sia patrujo kaj la religio — ne plu entrudata de malamika registaro — fariĝis afero pure privata. Per sia tricentjara servuteco ili ekonis la pezon de la perfortado pli ol su-

B. TITTL:

PRVÉ VOLBY V ČESKOSLOVENSKU.

Prvé volby do ĉeĥoslovanského parlamentu a senátu přinesly některá překvapení zahraničním pozorovatelům politického života v Československé republice, které se staly příčinou mnoha úvah zahraničních listů. Cizinec maně se ptá, zda výsledek voleb skutečně odpovídá národnímu smýšlení těch Čechů, vždy tak hrdých na svoji národnost, odpírajících jakýkoliv kompromis s Němci, s nimiž žili v jednom státě a od nichž byli ovládáni.

V posledních desetiletích, zvláště pak za světové války jevíli se Čechové na jedné straně jako národ krajně vlastenecký, na druhé straně pak jako národ po většině proticírkevní, takže se dalo očekávat, že výsledek prvých voleb samostatného Československa bude odpovídat jejich duchu. A zatím výsledek skrutinia oznamuje něco zcela jiného: strany národní obdržely poměrně malý počet hlasů, za to však mezinárodní sociální demokracie jest nejsilnější československou stranou a také klerikální »strana lidová« může se pochlubiti svým sesílením oproti posledním volbám do obcí.

Znamená to snad úpadek národního vědomí a současně návrat ke katolicismu? Klamal by se, kdo by tak soudil. Výsledek voleb jest příčinou čehosi jiného: Čechové dobyli své samostatnosti, stali se pány své vlasti a náboženství — ne více vnucované nepřátelskou vládou — stalo se záležitostí čistě soukromou. Svoji třistaletou porobou seznali více než dosti tíhu násilí a proto

fiĉe kaj tial ili nevolas perforteme estri tiujn, kiuj kune kun ili loĝas en ilia patrujo, la Germanojn kaj Magiarojn. La Bohemoj estas tradiciaj demokratoj kaj la novepokan socialismon ili konceptas kiel modernan kristanecon en ĝia origina idealismo: Egaleco de ĉiuj. Samajn rajtojn kaj samajn devojn. Jen estas la linio sur kiu ili volas kunveni eĉ kun la aliaj naciaj gentoj.

Se la Germanoj kaj Magiaroj, loĝantaj la Ĉeĥoslovakian respublikon, komprenos la veran sencon de la unuaj balotoj kaj se ili akceptos la al li prezentitan manon, tiam ekregos trankvilo kaj harmonio en la respubliko, kiuj sole povas alporti al la nacioj de Ĉeĥoslovakio feliĉon kaj bonstaton. Sed se ili volas valorigi en la Ĉeĥoslovaka parlamento la malnovajn pangermanajn ambiciojn, kiuj Aŭstrion pereigis, tiam ili revokos eĉ la naciecajn sentojn de la Bohemoj kaj kune kun ili eĉ novajn batalojn, kiuj alportos feliĉon nek al ili, nek al la tuta respubliko.

sami neĉtĉĉji nāsīlīm vlādnoŭti tĉm, kdoĉ spoleĉnĉ s nīmī obŭvājī jejjich vlast, Nĉmĉm a Maĉarŭm, Ĉeĉovĉj jsou tradicio-nelnī demokratĉ a novodobŭ socialismus ĉāpou jako modernī křest’anstvī ve svĉm prvotnīm idealismu. Rovnost vřeĉh, stej-nā prāva a stejnĉ povinnosti. To jest linie, na kterĉj ĉtĉĉjī se sejjīti i s druhŭmī nā-rodnīmī kmeny.

Pochopī-li Nĉmĉi a Maĉarī, Ĉeskoslo-venskou republiku obŭvājīcī, pravŭ vŭznam tĉĉhto prvŭch voleb a pŕijmou-li nabīzenou jim ruku, pak zavlādne v repu-blice klid a harmonie, kterā jedīnĉ mŭĉe pŕīnĉstī nārodŭm Ĉeskoslovenska řtĉstī a blahobyt. Pakliĉze vřak budou ĉtĉtīti v ĉe-skoslovenskĉm parlamentĉ uplatŕňovātī starĉ pangermānskĉ snahy, jeĉ pŕivedly Rakousko v zāhubu, pak vzbudī opĉtī i nā-rodnī city Ĉeĉŭ a s nīmī novĉ boje, kterĉ ani jim, ani celĉ republice řtĉstī nepŕīne-sou.

ESPERANTO KAJ BOHEMA NACIO.

Jen mi empresas interesan frag-menton el la lotero de nia fama samideano so. Ed. Kŭhnĭ, direktoro de Ĉeĥoslovaka konsulejo por His-panio, kies mirindan sorton ni menciis en la lasta numero de La Progreso.

Antaŭ jaroj, kiam mi estis forlasanta Bohemion por veturi al la X. Kongreso, mi ne estus dirinta, ke mia forestado daŭros jarojn kaj krom tio, ke mia scio de Esperanto estos tia grava helpilo en mia vivo. Efektive, en la momento, kiam la milito estis deklarita, mi povas diri, ke sole Esperantistoj konis nian nacion danke la senhaltan propagandon kaj informadon per leteroj, kartoj kaj la gazetoj. Mi ne konsideras en tiu ĉi momento la esceptojn — oficialajn!! La publiko estis por ni absolute fremda — por tiu ni estis Aŭstrianoj. Kiom oni povas bedaŭri, ke jam en tiu tempo niaj naciaj korporacioj, kiuj pri si deklaris servi la diskonigon de nia nacio en fremdlando, ignoradis inten-ce kaj pro nekomprenebla idiosinkrasio nian helpan lingvon! La milito estis deklarita kaj mi troviĝis en Francio kun sep aliaj geesperantistoj samlandanoj. La unua helpo en tiu momento, kiam nia

pořo pro deviga atendado tie sekiĝis, kaj kiam ĉiu nin konsideris aŭstrianoj, venis de la Esperantistoj parizaj — tiuj estis la solaj, kiuj povis kompreni nian situacion rilate Aŭstrion kaj kiuj nin tuj de post la unua momento konsideris amikoj. La oficialaj sferoj kaj la publiko bezonis por tio ankoraŭ kelke da jaroj. Kaj se nur en tiu ĉi sola okazo estus Esperanto farinta al mi servon, neniom mi bedaŭrus, ke mi dediĉis al ĝia propagando la tutan tempon de la lastaj dek aŭ dekkvin jaroj.

Sekvis poste periodo de kvin jaroj pasigataj en Hispanio. Mallonge mi diros: sen subteno proponita de samideanoj, mi ne scias, kiel mi estus povinta trapuŝi min en fremda lando, sen scio de la enlanda lingvo kaj sen mono (ne konsiderante la plī malfruan kaj nepre nesufiĉan, subte-non venantan de la konsulejoj, pri kiu mi memoras kun la plej maldolĉa sento; por klarigi la kaŭzon mi ne povas silentigi, ke la subteno estis pagata al mi, por ke mi daŭru konsideri Aŭstrion kiel zorgoplenan patrĉnon kaj ke mi ne timu reveni tien — por esti pendigita aŭ mortpafita, estinte kondamnita dum mia forestado. Pri tiu ĉi fakto mi eksciis nur post kiam la paco estis kontraktita).

Danke miajn ĉiujarajn vojaĝojn mi konatiĝis kun miloj da samideanoj kaj kon-

vinkiĝis, ke same, kiel en unu lando, ankaŭ en la aliaj oni konas nian nacion eĉ en la plej vastaj sferoj, sed nur per la rilatoj inter Esperantistoj. La amasoj da leteroj, kartoj kaj fotografiaĵoj, kiujn dissendis al siaj korespondantoj la samideanoj bohemiaj, reproduktataj en la fremda preso, estas laboro neniam sufiĉe taksata!

○○○

LA Batalo por TĚŠĪNIO.

(Boheme TĚŠĪn, germ. Teschen, pole Cieszyn.)

El la regiono de TĚŠĪn, pri kies ŝtatligeco oni decidis per plebiscito, venas raportoj tre malgajaj. Perfortaĵoj tie okazantaj mirigas ĉiun senpartian observanton de la situacio tie ekreginta. Se oni volas eviti pluan vastiĝon de abomena partia fanatismo antaŭ ol ĝi tute ruinigos juran ordon de la lando, estas necese fari plebisciton kiel eble plej baldaŭ. Ne estas ja eble ke la revolveroj en la manoj de instigitaj nekleraj kaj perfortemaj individuoj kaj bandoj malebligu kiu ajn esprimon de kontraŭa opinio.

Se la Entento decidis ke per la plebiscito oni traktu pri la regiono, kiu jam de la j. 1291 apartenas al la bohemiaj landoj kaj al la iama Bohema ŝtato, ke oni traktu pri la regiono, kies loĝantaro estis en la lastaj du jarcentoj en sia granda parto arte germanigita kaj poligita, tiam estas necese, ke pro la nuna senordeco tie reganta kaj ĉiam ankoraŭ kreskanta, oni decidu plej baldaŭ.

En TĚŠĪnio loĝis laŭ la lasta aŭstria popolsumigo en 1910 233.000 Poloj, 77.000 Germanoj kaj 115.600 Bohemoj. La aŭstria statistiko estis ĉiam farita kun intenco kontraŭbohema kaj ankaŭ tie ĉi ĝi ne estas ĝusta. (Por pruvi tion ni donas unusolan akzemplon: en Rychnwald, reg. de TĚŠĪn laŭ tiu ĉi statistiko loĝis 11 Bohemoj, kaj tamen en la loka bohema lernejo estis 300 bohemiaj infanoj!) Kiel Poloj estis tiam kalkulitaj ankaŭ la »ŝlonzakoj« (Silezianoj), speciala gento, per sia lingvo kaj kulturo multe pli parenca al la Bohemoj ol al la Poloj. Tiun fakton atestas eĉ iliaj naciaj kostumoj similaj al tiuj en nord-orienta Moravio. Tiu ĉi gento, havanta pli ol 70.000 membrojn estas kiel »ŝlonzaka partia ludova« (Silezia partio popola) reprezentata per sia gvidanto Koždoň, laŭ kiu ĝi estas nomata ankaŭ »Koždoňovci«. La tendenco de ŝlonzakoj estas akre kontraŭpola; per la plebiscito ili voĉdonos por la Ĉeĥoslovaka respubliko. Ankaŭ la intereso de la Germanoj ordonas, ke ili balotu por Ĉeĥoslovakio kie ili plifortigos la germanan ele-

menton, al kiu la Bohemoj jam nun faras gravajn koncesiojn. Estante kutimaj al ordo, ili certe preferos ordigitan Ĉeĥoslovakion antaŭ la senorda Polio, kie ĝis nun administras la landon du registaroj: en Warszawa kaj en Kraków, kiuj reciproke ne konkordas. Tiu ĉi situacio estas ĝenerale konata kaj tial organizitaj kaj fanatigitaj polaj bandoj venĝas sin ne nur al Bohemoj kaj ŝlonzakoj, sed eĉ al Germanoj. Tiuj bandoj armitaj per bomboj kaj revolveroj estas formitaj grandparte el iamaj polaj soldatoj kaj atakas loĝejojn de la personoj, pri kiuj estas konate, ke ili favoras Bohemojn. Rabado, detruado kaj mortigado estas tie ĉi sur tagordo. La malaltaj pasioj de malkleraj fanatikuloj sin tiel malŝarĝas. Per terorismo oni volas vekti la ŝajnon, ke la plebiscito estas tie neebla.

Kaj tamen nur la plebiscito plej baldaŭ okazonta povas enkonduki la ordon en la landon.

La Poloj rifuzas la sole justan vidpunkton, ke al la plebiscito oni allasu sole la ŝtatanojn ke TĚŠĪnio kaj ne eĉ la almigrintojn de la lastaj dek jaroj, ĉar per tiu ĉi aranĝo ili perdus 50—70 mil. voĉojn.

So. Zamorski la estinta reprezentanto de la pola registaro en la Internacia Plebiscita Komisiono skribis en »Glos Nárada«, ke la prezidanto de tiu komisiono so. Maneville volas fari ĉion, ke la plebiscito havu bonan rezultaton por Bohemoj. Ankaŭ pri la japana reprezentanto so. Yamada oni skribis, ke li kondutas kvazaŭ partiano de Bohemoj.

La Poloj obstine postulas la regionon, kiu ne estis ilia, kiun por sia ekzisto ili ne bezonas. Ili postulas la karbminejojn de TĚŠĪnio, kvankam ili havas je 25% pli da karbo ol la Anglio mem. Sed ili ekspluatas ĝin tiel malekonomie, ke la Ententa komisiono ku vizitis la polajn minejojn miregis, kiel nepraktike oni ĝis nun ekspluatas la karbon.

Laŭ la bohema vidpunkto TĚŠĪnio estas pulmo de Ĉeĥoslovakio kaj sen la minejoj de TĚŠĪnio la riĉa Ĉeĥoslovaka industrio ne povus ekzisti. Tial la Bohemoj neniam rezignos je TĚŠĪnio

○○○

AITARŌ JAMONŌI, Tokio:

MI. KAJ ĈEĤA LINGVO.

Somere, en la jaro 1917, por trankviligi mian neurastenian kapon, mi translokiĝis en unu budhisman monaĥejon sur la marbordo K a t a s e en ĉirkaŭaĵo de la historie fama urbeto K a m a k u r a. La ĉefa simptomo de mia malsano estis melankolio,

kaj mi ne ŝatis havi tiel nomatajn »somerdomajn amikojn«, kvankam multaj urbanoj loĝis tie, inter kiuj eĉ miaj universitataj kolegoj. Do, restante en mia ĉambro, mi ĉiutage gajigis min per legado de tagĵurnaloj. Tie mi ofte trovis la nomojn »Bohemio« kaj »Ĉeĥo« kaj tial mia memoro returnis sin al mia gimnazia vivo, kiam mi lernis la eŭropan historion kaj en mia kapo reaperis: Václav IV., Mistr Jan Hus, Žižka, Palacký . . . Tiam mi ne kredis pri sukceso de tiu malgranda popolo inter najbaraj grandaj ŝtatoj kaj miaj okuloj transiris al aliaj interesajoj.

En gazetoj ofte aperis raportoj pri Masaryk, Kramář kaj Beneš kaj kaŭze de tio mi kun scivolemo penis rekolekti miajn sciojn pri Bohemio kaj tial ree komencis legi la anglan verkon »Bohemia« skribita de C. Edmund Maurice. Tiu libro estis mia unusola peranto de la kompreno pri la ĉeĥa popolo kaj tra leginte ĝin mi komprenis, ke la ĉeĥa patruja amo estas intima amiko de »Jamato-damaŝij« t. e. pia kuraĝeco de japana patrioto. Kaj tiam mi ekdeziris lerni la ĉeĥan lingvon kaj tial mi mendis kelke da anglaj libroj de ĉeĥa gramatiko, ĉar mi opinias, ke por kompreni iun nacion, estas antaŭ ĉio necese konatiĝi kun ĝia lingvo. Krom Esperanto mi ellernis angle, germane, france, itale kaj ruse, estante 24 jara abituriento veterinara. Dume venis aŭtuno kaj estis tempo reveni en Tokian universitaton.

En oktobro havis la Tokiaj esperantistoj la unuan kunvenon en sia oficejo kaj tiam nia sekretario montris al mi la ekzemplerojn de diversligvaj esper. lernolibroj, inter kiuj estis ankaŭ: la bohema eldono de Fundamento de Esperanto kaj de Ĉejka Slovníčky Esp.-český a česko-esperantský. Kaj kiel mi komprenis, ke tiuj libroj estas verkitaj ĉeĥe? Komprenilo por tio estis sole la litero »ř«, kiun mi ofte trovis en la verko de Maurice. Mi aĉetis ĉion kaj kvankam mi ne konis la fonetikecon de la ĉeĥa gramatiko, mi ellernis de tie vicon da vortoj k. e.: pes, pták, pán, mám, byl, proč, zde, ač, ačkoliv, učitel, otec k. t. p.

Post unu semajo, ĉiuj gazetoj en Tokio publikis sian bonvenan saluton al la ĉeĥaj vunditoj kaj malsanuloj venintaj en la hospitalon de Amerika ruĝa kruco en Tokio. Post longa meditado mi decidiĝis ilin viziti, fidante al mia scio de ĝermana lingvo.

Mi forgesis la daton, sed tiam estis bela aŭtuna tago. Kun espero kaj timo, mi, malaltkreska kaj malgrasa studento tien marŝis. Sur marbordo Sumida, antaŭ la insuleto Cukiŝima trovas sin la hospitalo. Starante antaŭ ĝi, mi ekvidis kelkajn soldatojn kaj mi ektimis ĉu ili min komprenos. Tamen kuraĝiĝinte mi eniris en la antaŭkorton kaj montrante al ili miajn tutajn ĉeĥaĵojn mi alparolis ilin: »Nazdar, pane, sprechen Sie deutsch?« Kun stranga rigardo unu el ili demandis min, kion mi volas de ili.

»Mi tre deziras lerni la ĉeĥan!« — »Kial vi volas ĝin lerni?« — »Por kompreni vin per via lingvo.«

Tiam unu juna kapitano diris al mi, ke li nun havas multe da libera tempo kaj ke mi venu ĉiutage post la tagmanĝo. Tiel li, so. dro. Karel Dokoupil, al mi promesis instrui la ĉeĥan lingvon. Tiamaniere mi konatiĝis kun mia unua ĉeĥa amiko. Mi vizitis lin ĉiutage kaj iom post iom mi konatiĝis kun ĉiuj ĉeĥaj soldatoj en la hospitalo. Jam post unu monato mi sufiĉe komprenis, kion ili malrapide al mi parolis. Kelkaj el ili vizitis mian hejmon kaj konatiĝis kun miaj familianoj, kun kelkaj mi vizitis la japanan aviator-kapon Tokorozawa apud Tokio. Tiutempe mi konatiĝis ankaŭ kun generalo Ŝtefánik, kiu vizitis la hospitalon. Por unu moravia juna soldato mi ofte tradukis ĉeĥen la leterojn de lia amatino — japana flegistino. Ĉiutage mi penis paroli ĉeĥe kaj post kvin monatoj mi povis kredi, ke mi komprenas ĉion ĉeĥe parolatan. Kaj jen en »Československý deník« aperis pri mi artikolo sub la titolo »Tokijský ĉeĥofil«. Tiel mi travivis ok monatojn. La 14. de februaro en pasinta jaro la ĉeĥaj soldatoj forveturis hejmen salutante min per »Nazdar!«

De tiam forpasis unu jaro kaj nun krom la legacio loĝas en Tokio preskaŭ 30 Ĉeĥoj, kiujn mi vizitas trifoje en semajno por paroli ĉeĥe. Ĝis antaŭ duonjaro, mia lernado ne estis konata de Japanoj, kvankam ĉiuj Ĉeĥoj en Japanio estis kaj estas miaj konatuloj. La 25. de la pasinta oktobro la japanaj nobeloj kaj inteligentuloj havis bonvenan kunsidon kun la ĉeĥa delegitaro en Tokio. Tiam ili serĉis Japanon parolantan ĉeĥe sed ne povinte lin trovi, ili turnis sin al mia amiko so. dro. Němec, eksambasadoro en Tokio, kies deziron mi plenumis ĉeestante dum la kunsido kiel

gasto. Mia scio de ĉeĥa lingvo kaŭzis surprizon de ĉiuj japanaj ĉeestantoj kaj tial naŭ gazetoj en Tokio publikis pri mi artikolojn kun mia fotografajo, titolitajn: »Unua Japano parolanta ĉeĥe«. Tial mia nomo fariĝis tre populara.

Mi fariĝis amiko de Ĉeĥoj en Japanio. Celante la ĉeĥo-japanan amikiĝon mi skribas pri Bohemio en gazetoj, jam tri foje mi faris paroladon pri Jan Hus kaj nun mi tradukas japanen »Ideály humanitní« de dro. Masaryk.

Ĉiam mi devas esti amiko de Ĉeĥoj kaj se iu el Bohemio bezonas mian servon, mi volonte helpos. En mia koro nun ardas espero vojaĝi en Ĉeĥoslovakion kaj mi avida atendas tiun tempon.

Nazdar! Ĝis nia renkonto en Praha!

ESPERANTISMO

HECTOR HODLER MORTIS!

Profundan doloron kaŭzis al ni la malĝoja sciigo, sendita al ni de la Centra oficejo de U. E. A. pri la morto de ĝia fama direktoro kaj fondinto so. Hector Hodler, kiu mortis en Leysin la 31. marton en aĝo de tridek-tri jaroj.

Nova doloro por ni, nova funebro! La kruela sorto staras kontraŭ ni kaj ni ne havas potencon ĝin mildigi. Kia doloriga vundo estis al ni farita per foriro de Carlo Bourlet, de B. Mudie, de Th. Rousseau, de nia neforgesebla Zamenhof — kaj nun eĉ Hector Hodler ne plu vivas!

Kial ĵus li? Tiel mi demandas, memorante mian konatiĝon kun li dum nia IV. kongreso en Dresden, kie okazis en la jaro 1908 la unua kunveno de U. E. A., sub honora prezido kaj ĉeesto de dro. Zamenhof en la Aŭlo de Teknika lernejo. Tiam la unuan fojon mi vidis paroli tiun junan, elokventan kaj al Esp. tute sindonan viron, kiu gajnis mian koron. Mi vidis en li lertan praktikiston kaj jam de la unua renkonto kun li mi kredis, ke li kaj lia Asocio fariĝos grava faktoro de nia movado. Sed kial memori liajn meritojn ĝenerale konatajn, kial citi lian grandegan labron, kiun ne povas egali laboro de mil aliaj esperantistoj . . .

Li forlasis niajn vicojn kaj la laboro de li forlasita nin vokas . . . Ĉu vi aŭdas?

Al lia edzino kaj al la Centra oficejo de U. E. A. mi esprimas en la nomo de La Progreso plej sincerajn kondolencojn.

B. Tittl.

ccoo

DE ASOCIO.

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista (Ĉ. A.

E.), fondita en Praha la 1. an de februaro 1920 per unuanima decido de membroj de ambaŭ antaŭmilitaj centroj (Unio kaj Asocio), organizas principe individuajn esp.-istojn, ebligante al ĉiu ĉ.-s. samideano direktan influon je administrado kaj gvidado de la centra organizaĵo. Ĉiu membro havas rajton voĉdoni dum la ĝenerala kunveno; se li ne povas partopreni, li povas cedi sian rajton al kiu ajn alia membro.

Estu fonditaj lokaj grupoj en ĉiu loko, kie estas almenaŭ 15 membroj de Asocio.

Grupoj jam ekzistantaj anigu siajn membrojn al Ĉ. A. E., donante iliajn plenajn adresojn.

Aniĝojn akceptas ĝen. sekretario Rud. Hromada, Praha VII. Sochařská, 333. (Ne hezitu sendi.)

Jara kotizaĵo estas 10 Kč, por studentoj 5 Kč. Kotizaĵon de membroj organizitaj en lokaj grupoj, la Asocio lasas al tiuj ĉi lokaj grupoj por loko propagando, postulante sole po 2 Kč por ĉiu membro. (Korektu la erarajn ciferojn en la lasta n-ro de Progreso.)

Kotizaĵojn akceptas kasisto Fr. Novák, horloĝisto, Praha I. Malé nám. 10. (Sendu senprokraste.) Kiel Komitatanoj estis elektitoj: Prez: Jos. Eiselt, gimnazia eksdirektoro, Praha. Vicprez: Dr. Stan. Karmarýt, profesoro, Bratislava (Slovakio). Ĝen. sekretario: Rud. Hromada, oficisto, Praha. Kasisto: Fr. Novák, horloĝisto, Praha. Dr. Jos. Fousek, advokato, Přelouč; Prof. Rud. Fridrich, Prostějov; Jos. Pech, prez. de Lab. Asocio, Plzeň; A. Pitlík, ministeria oficisto, Praha; K. Svačina, instruisto, Č. Budějovice; J. Šupichová, instruistino, Praha; B. Tittl, red. de Progreso, Plzeň; J. Tadránek, red. Žilina. Anstataŭantoj: Inĝ. L. Berger, Moravany; A. Janalíková, instr., Týstice p. H.; Fr. Kessler, preseja admi-

nistristo, Zlín; Inĝ. Vincenc Kroužil, profesoro, Brno; A. Kudela, oficisto Olomouc; J. Špriska, librovendisto, Žilina.

Kontrola komitato: Alfred Borovský, bankoficisto, Praha; Fr. Kavan, administristo de Progreso, Plzeň; V. Kraus, mag. oficejestro, Praha; Inĝ. R. Novák, ĉefinĝeniero, Plzeň; O. Sklenčka, bankoficisto, Hradec Králové. Anstataŭantoj: X. Kučera, ŝparkasisto, Rakovník; V. Němec, bankoficisto, Karlovy Vary; J. Popper, oficisto, Žilina.

Samideanoj!

Longe sopirata centra organizaĵo fine konstituiĝis. Sed por ke Asocio ne restu sole sur papero, kontraŭe, por ke ĝi estu firma interne por povi eklabori kiel eble plej baldau inter la publiko neesperantista, estas en la unua vico necese havigi al si precizan kaj nepre fidindan, bildon pri tio, kio en nia respubliko jam estis atingita, t. e. en kiu stato nia movado nun troviĝas.

Ĉiujn klubojn, rondetojn ktp. ni petas respondi plej baldau la jenajn punktojn:

1. Nomo, sidejo, preciza adreso de klubo, rondeto k. t. p.

2. Nomoj kaj adresoj de komitatanoj.

3. Nombro de pagintaj membroj en 1919, nombro de pagintaj m. en 1920.

4. Adresojn de membroj.

5. Jara kotizajo.

6. Kiel kaj kiam vi regule kunvenas? Meza nombro de partoprenantoj.

7. Kiujn esp. gazetojn klubo abonas? Kiujn kaj kiom da ili viaj membroj.

8. Kiom da libroj enhavas kluba biblioteko?

9. Kiom da U. E. A. anoj estas en via klubo? En via urbo?

10. Kursoj: Kie, kiam, kiu instruis, kiom da partoprenantoj en la unua kaj en la lasta lecionoj? Kiom el ili aliĝis al la klubo?

11. Cetera ekstera laboro depost 1.-10. 19, publikaj paroladoj, amuzvesperoj ktp. Ilia rezultato?

12. Viaj specialaj demandoj, deziroj kaj proponoj.

Skribu laŭvere, netrograndigante!

Skribu tuj!

Gen. sekretario. v

o o o o

KURSA LERNOLIBRO

(Daŭrigo.)

Tria leciono.

Kie? Sur, sub, antaŭ, post, inter, en, apud.

Kiu? Mi, vi, li, ŝi, ĝi, ni, ili — estas.

Kies? Mia, via, lia, ŝia, ĝia, nia.

*

La nigra libro estas sur la tablo, la ruĝa libro estas sub la tablo. La tablo estas antaŭ mi. La muro estas post vi. La tablo estas inter mi kaj vi. Mi estas antaŭ la tabulo, vi estas inter mi kaj la muro. Ni estas en la ĉambro. La plumo estas en la libro.

Kie estas la nigra libro? — Ĝi estas sur la tablo. Kie estas la ruĝa libro? — Ĝi estas sub la tablo. — Kie estas la tablo? — Kie ni estas? K. t. p.

Kiu mi estas? Kiu vi estas? Kiu li estas? Kiu ŝi estas? Kiu ni estas? Kiu ili estas? — Mi estas instruisto, vi estas lernanto. Li estas ankaŭ lernanto. Ŝi estas lernantino.

La seĝo estas apud la tablo. Mi estas apud la tabulo. — Apud kio estas la seĝo? Kie estas la seĝo? — Sub kio estas la ruĝa libro? Sur kio estas la nigra libro? Kie estas la ruĝa libro? Kie estas la nigra libro?

*

Tio estas mia kraĵono kaj tio estas via kraĵono. — Mia kraĵono estas ruĝa kaj via kraĵono estas blua. — Kies kraĵono tio estas?

Kies libro tio estas? — Tio estas mia libro. — Kies plumo tio estas? — Tio estas lia plumo.

Kies libro estas nigra? — Ŝia libro estas nigra.

Nia ĉambro estas granda. Via libro estas dika. Ŝia libro estas maldika. Lia plumo estas sur la tablo. Kie estas via libro? — Ĝi estas ankaŭ sur la tablo. — Mia kraĵono estas verda; via kraĵono ne estas verda, sed ĝi estas blua. Jen estas via kraĵono, ĝia koloro estas blua.

Kvara leciono.

Kie — kien, kio — kion. La libro estas sur la tablo. — Kie estas la libro? — Ĝi estas sur la tablo. — Mi prenas la libron kaj metas ĝin sur la seĝon. — Kien mi metas la libron? — Sur la seĝon. — Kie nun estas la libro? — Sur la seĝo. — Mi prenas la kraĵonon kaj metas ĝin en la

poŝon. — Kien mi metas la kraĵonon? — En la poŝon. — Kie estas la kraĵono? — En la poŝo. — Kio estas en la poŝo? — La kraĵono. — Kion mi metas en la poŝon? — La kraĵonon.

Mi ŝovas la seĝon kontraŭ la tablon. — Kion mi ŝovas kontraŭ la tablon? — La seĝon. — Kien mi ŝovas la seĝon? — Kontraŭ la tablon. — Mi fermas la pordon. — Kion mi fermas? — La pordon. — Mi malfermas la pordon. — Kion mi malfermas? — La pordon.

Prenu la libron! — Vi prenas la libron. — Li prenas la libron. — Ŝi prenas la libron. — Metu ĝin sur la seĝon! — Vi metas la libron sur la seĝon. — Kion vi metas sur la seĝon? — Kien vi metas la libron? — Kiu metas la libron sur la seĝon?

Donu la kraĵonon en la poŝon! — Kion vi faras? — Mi donas la kraĵonon en la poŝon. Kien vi donas la kraĵonon? — Kion vi donas en la poŝon? — Metu la ruĝan paperon en la nigran libron! — Kion vi faras? — Mi metas la ruĝan paperon en la nigran libron. — Kion vi metas en la nigran libron?

Sinjoro Borel, prenu la nigran libron! — Kion faras sinjoro Borel? — Li prenas na nigran libron. — Kion prenas sinjoro Borel? — Kiu prenas la nigran libron? Fraŭlino X. malfermu la libron! Kion faras fraŭlino X.? — Ŝi malfermas la libron. — Kiu malfermas la libron? — Kion malfermas fraŭlino X.?

Mia, via, lia, ŝia, ĝia, nia, ilia, sia. — Jen estas mia libro kaj jen estas via kraĵono. Jen estas ŝia ĉapelo. — Jen estas la papero, ĝia koloro estas nigra. — Jen estas la libro, ĝia koloro estas verda. — Nia klaso estas longa kaj larĝa. — Via libro estas dika. — Ilia frato skribas. — Lia frato sidas kun sia fratino en la ĝardeno. — Li sidas kun sia fratino en la ĝardeno. — Li kaj lia fratino sidas en la ĝardeno. — Ili sidas en la ĝardeno. Mia libro kuŝas sur la tablo antaŭ mi. — Via libro kuŝas sur la tablo antaŭ vi. — Lia libro kuŝas antaŭ li kaj ŝia libro kuŝas antaŭ ŝi. — Niaj libroj estas sur la tablo. — Viaj libroj estas ankaŭ sur la tablo. — Iliaj kraĵonoj estas longaj. — Mia kraĵono estas verda kaj la via estas ruĝa. — Mia libro estas griza kaj via libro estas bruna. — Lia libro estas dika, ŝia kraĵono estas longa.

Sinjoro Borel, donu el mi vian libron! — Sinjoro Borel donas al mi sian libron.

Fraŭlino X., donu al mi vian kraĵonon! — Fraŭlino X. donas al mi sian kraĵonon. — Diru al mi vian nomon. Mia nomo estas Lebrun. Via nomo estas Cart.

Kvina leciono.

1 unu, 2 du, 3 tri, 4 kvar, 5 kvin, 6 ses, 7 sep, 8 ok, 9 naŭ, 10 dek.

11 dek unu, 12 dek du, 13 dek tri, 14 dek kvar, 15 dek kvin, 16 dek ses, 17 dek sep, 18 dek ok, 19 dek naŭ, 20 dudek, 21 dudek unu, 22 dudek du, 23 dudek tri.

30 tridek, 40 kvardek, 50 kvindek, 60 sesdek, 70 sepdek, 80 okdek, 90 naŭdek, 100 cent, 1000 mil.

356 tricent kvindek ses, 1820 mil okcent dudek, 1920, mil naŭcent dudek.

Mi komputas (esp. komputi, angle to count, france compter, itale contare, germane zählen, boheme čítati): unu, du, tri, kvar k. t. p. Komputu de ses ĝis dek. — Ses, sep, ok, naŭ, dek. — Komputu de dudek ĝis tridek.

Mi kalkulas (esp. kalkuli, angle to calculate, france calculer, itale calcolare, germane rechnen, boheme počítati): du kaj du estas kvar, tri kaj tri estas ses, tri foje tri estas naŭ, dek sen tri estas sep.

Kiom estas dek kaj dek? — Kiom estas sep kaj dek-tri? — Kiom estas dudek-kvar kaj dek? — Kiom estas tri foje dek? — Kiom estas kvin foje tri? — Kiom estas ok foje sep? — Kiom estas dek sen du? — Kiom estas dek-ok sen ok?

Kio estas pli multe, ok aŭ dek-ok? Kio estas pli multe dudek-kvin aŭ tridek-tri? — Kio estas pli malmulte, ok aŭ kvin, kio estas pli malmulte, kvardek aŭ tridek-ses?

Kia diferenco estas inter dek kaj ok? — La diferenco inter dek kaj ok estas du. — Kia diferenco estas inter tridek-tri kaj dudek-du?

Jen estas unu kraĵono, du kraĵonoj, tri kraĵonoj. Du libroj, tri libroj, kvar libroj. Kvin seĝoj, tri tabloj, du fenestroj, unu pordo. — Kiom da libroj kuŝas sur la tablo? — Sur la tablo kuŝas tri libroj. — Kiom da lernantoj estas en tiu ĉi ĉambro? — Kiom da fenestroj havas tiu ĉi ĉambro? — Kiom da bildoj estas sur la muro? — Kiom da personoj estas tie ĉi?

(Daŭrigo.)

LITERATURO

Antonín Klášterský:

DOLOROZA.*)

Kun infanet' malsana apud urba muro
eksidis la patrín' kaj vidis kun teruro
la fortoj de l' ideto ŝia kiel svenas,
spirado kiel ĉesas kaj la fino venas —
kaj de okuloj ŝiaj rulis larm' post larmo.

Jén preterpaŝis Kristo inter homa svarmo.
Ŝi al li manojn levis ku sincera peto:
»Sinjoro, proksimiĝu, helpu al ideto,
ĝi, vidu, mortas jam, kaj vi miraklojn
faras!«

Kaj Krist' tuj proksimiĝas, kaj pensante
staras.
Li vidas lignan krucon, sur ĝi sian finon,
apude dolorĝemi, plendi la patrinnon;
li vidas, kiel sangas, kreas ŝia koro,
sed help' ne venas al ŝi en ĉi tiu horo
kaj oni eĉ ridegas je doloro vana.

Li tuŝis la infanon kaj ĝi iĝis sana.

ooo

KAJ TAMEN!

Rakonto vera kaj preskaŭ instrua.
El bohema lingvo tradukis F. K. Svachina.

Sub la piedoj kraketis neĝo. La stelo,
hele brilis dum sennuba marta nokto kva-
zaŭ ekbruligitaj kandeloj de ĉiela krist-
naska laboro. Super turo de urbestraro
staris la luno. Ĝi ridis, kiel ĝi ridas ĉiam,
sed al Manjo ŝajnis, ke ĝi ridas pli multe
kaj ke ĝi mokas ŝin. Malespere ŝi ekpen-
sis: »Kiel ĉi povas ridi, luneto, dum mi
estas tre korpemita?« Tamen ĝi daŭrigis
la ridon.

La viro, kiu paŝis flanke apud Manjo, vi-
dis la samon. Lia rigardo estis fiksita sur
mallarĝa, bela vizaĝo de la knabino kaj
poste ĝi transglitis sur ĉielan globon, kiu
lumigis la placon de malgranda regiona
urbo, kaj sur sennombrajn stelojn ombri-
tajn de neĝeroj.

»Morgaŭ je tiu ĉi tempo mi estos mal-
proksime de ĉi tie, fraŭlino Manjo,« diris
la akompananto de Manjo. »Morgaŭ ŝajnos
al mi la jaro, kiun mi travivis inter muroj
de via urbo kvazaŭ sonĝo, kaj la bruego
de grandurbo superbruados rememorojn

*) El la ne ankoraŭ presita verko de nia
mortinta kunlaboranto MUDr. St. Schulhof
»Echomaj Grenadoj«.

pri ĝi. Sed mi malebligos tion. Mi volas
por ĉiam enfermi en mia koro la remem-
ron pri ĉi tiu vintra nokto, kiu tamen an-
taŭsentigas jam zefiron de venonta prok-
sima printempo. Kaj en la mezo, vi, en via
malhela mantelo, sub kiu via malpezeta
dancrobo susuras, kiel la venonta prin-
tempo sub neĝokovraĵo.«

Manjo estis kvazaŭ muta, vortnepova:
ŝi aŭdis paŝojn de la gepatroj post si kaj
sentis sin malfeliĉa. Ŝi tamen sentis, ke
lia koro batas por si kaj ke li ofte devis
regi sin por neekpremi ŝin al sia brusto.
Kaj tamen — kiukaŭze li silentis? Kial
li ne kiskovris ŝian buŝon avidan-
tan liajn kisojn? Kial li ekparolis eĉ ne
hodiaŭ, kiam ĉiuj atendis tion — la patro,
la patrino kaj la tuta societo? Oni povis
legi sur sciavidaj kaj ridemaj vizaĝoj de
urbaj klaĉulinoj: »hodiaŭ estos anoncita
fianĉiniĝo, hodiaŭ antaŭ la forveturo, la
fianĉiniĝo de Manjo Hajná kun inspektoro
Helmih.«

Skarlata ruĝo surkovris la vizaĝon de
la juna knabino. Jam nemalproksime estis
la domo, en kiu loĝis ŝiaj gepatroj. Sole
ankoraŭ kelke da minutoj, kelke da paŝoj
kaj la adiaŭdiro komenciĝos.

Silente paŝis la junaj homoj kune. An-
kaŭ li vidis jam la domon, la finan celon
de ilia irado kaj malfacile venkis sian
emocion. Kiel li dezirus kisi ŝin, premi
siajn lipojn al ŝiaj fermetitaj junaj lipe-
toj! Sed tiame li estus fianĉiĝinta, ĉar
post ili paŝis la gepatroj kaj ili tuj alrap-
tus kun sia beno.

Tio estus frenezaĵo. Ĉi tiu malgranda
trodorlotita Manjo, ĉi tiu knabino, kiu
mankis ĉe neniu balo kaj ĉe neniu feste
kaj kiu havis ofte novajn robojn, kvam-
kam estis konate, ke juĝa konsilanto Haj-
ný ne estis riĉa. Ĉi tiu Manieto, kiu sciis
nenion alian ol okupi sin pri sia juna be-
leco, pasigi tutajn tagojn antaŭ la spegulo
ne, ŝi ne povis fariĝi edzino de oficisto kun
relative malgranda salajro!

Ĝus ili iratingis la dompordegon. Johano
Helmih donis la manon al sinjoro juĝa
konsilanto, kisis la manon de la sinjorino
kaj ne sciis mem, kion li parolis pri ne-
forgeseblaj tagoj kaj pri revido. Poste li
tenis maneton de Manjo en sia mano. Li
ne estis vortkapabia. Li klinis la kapon
super malhela ganteto kaj alpremis al ĝi
siajn lipojn. Kaj li ne povis alie, li devis
pensi pri tiu momento, kiam li kisadis ĉi
tiun maneton, sen kovraĵo, sole molan epi-
dermon, kiu sub liaj ardaĵoj ruĝeĝis.

»Bonan nokton, sinjorino Helmih!«, di-
ris Manjo ŝajne trankvile. »Ne maltrafu
morgaŭ la vagonaron!«

Li ridis afekte. »Post la danĉpasigita nokto ĝi estus ebla — la sepa horo estas frua! Sed la devo vokas! Do je revido, fraŭlino Manjo!«

Ŝi respondis nenion, bone sciante, ke la lasta vorto estis frazo. Eble li kaŝe ĝojis, ke li liberoĝos de ŝi kaj sendube li ne povis jam ĝisatendi la momenton, kiam li forlasos la enuigan malgrandan urbon kaj kiam samtempe malaperos eĉ tiu malgranda, sensignifa knabino —

Korpremita ŝi mansignis al li por adiaŭo. Ŝi sentis, ke ŝiaj fortoj elĉerpiĝas. La punktmakuloj de ŝia vualo dancis antaŭ ŝia vidosento, flua ardo degutis el ŝiaj okuloj kaj fluis sur la vangoj malsupren.

»Manjo!«, vokis la patro, starante jam en malfermita dompordego.

Kvazaŭ en febro ŝi fluge kuris supren sur la ŝtuparo. En la loĝoĉambro ŝi forĵetis la jakon de sur si, eltiregis ruĝajn rozojn el blondaj haroj kaj retenis al si sole tiun bukedon ĉe la talio, kiun ŝi ricevis de li. (Daŭrigo.)

DIVERSAĴOJ

Faru vian devon! Tiel ni vokas al ĉiuj Ĉeĥoslovakaj Esperantistoj, kiuj ĝis nun ne sendis al ni sian abonon. La ĝenerala gazeta krizo, kaŭzita per la grandega prezo de papero kaj de presejaj laboroj fariĝas por la ekzisto de nia gazeto tre danĝera. Oni konsideru, ke per unu ekzemplero (okpaĝa) de »La Progreso« ni jam pagas preskaŭ unu Kĉ, ke proksimume 350 ekzemplerojn ni dissendas tute senpage, ni havas eĉ gravajn elspezojn aliajn, kaj vi komprenas, ke nur per helpo de ĉiu bohema esperantisto povas esti garantiata daŭra prosperado de nia gazeto. Ni ne petas almozon de vi, sed ni postulas la plenumon de via devo. Doktoro Zamenhof iam skribis: »Kiu ne subtenas sian nacian gazeton, tiu ne estas Esperantisto!« Konsideru tiun eldiron kaj agi!

Esperanto en Rusio. »Izvestia«, la oficiala organo de la registaro de la Sovjeta respubliko anoncas, ke la Lingva komisiono de la Popola komisararo por publika instruado finis siajn studojn pri la arta lingvo internacia kaj deklaris Esperanton la plej tanga el ĉiuj ĝisnombaj projektoj Bazante sur tiu ĉi deklaro, la Popola komisararo por publika instruado decidis enkonduki Esp. en ĉiujn lernejojn de la Sovjeta respubliko. La deviga instruado de E. estis komencita en Petrograd, Moskva, Smolensk kaj Orel. La registaro donacis al esperantistoj de Moskvo komfortan domon, kiu antaŭ la revolucio apartenis al la konata riĉulo Lepatin. En la nune konata »Domo de Esperanto« estas klubaj ĉambroj, legejo, lernoĉambro kaj biblioteko.

Pri Dro. Zamenhof. En la maja kajero de »The British Esperantist« rakontas so. Blaise,

ke veturante el Bruselo al Ostende, li konatiĝis en la vagonaro kun sinjoro nomata Frenkel, el Varsovio, kies patro estis posedanto de la domo, en kiu loĝis dum multaj jaroj nia Majstro (9. ul. Dzika). Li rakontis, ke Dro. Zamenhof estis la plej lerta okulisto en Varsovio, konata ĉie en Polio pro sia lerteco, bonkoreco kaj malegoismo. La malriĉulojn li kuracis tute senpage kaj de la riĉuloj li postulis nur malgrandan sumojn. En ĉio li estis idealisto kaj lin sindone helpis lia edzino.

Finna-boĥemc reciprkeco. La »Esperanta Finnlando« enpresas en sia aprila kajero artikolon titolitan »Helpu al niaj amikoj mez-eŭropaj!«, en kiu oni parolas pri la amikaj rilatoj finno-boĥemaj kaj finno-magiaraj kaj memorigas la malbonajn valutkondiĉojn de Ĉeĥoslovakio kaj Magiaro, kiuj ne permesas al la loĝantoj de tiuj landoj aboni la »Esp. Finnlandon. (Laŭ nia valuto kostas la »E. F.« 60.— Kĉ.) Al la ĉeĥoslovakaj esperantistoj oni proponas helpon en tiu senco, ke ili pagu 24.— Kĉ al la administracio de La Progreso, por kiuj ili ricevos la »Esp. F.« Por la pagita sumo nia administracio sendos 2 jarkolektojn de »La Progreso« al la finnaj abonintoj, kiuj pagis 12.— Fm. al la administracio de la »E. F.« — Kun tiu ĉi arango ni tute konsentas, rekomendante la legadon de la »Esperanta Finnlando«, kiu jam pro sia simpatia enhavo kaj belaj ilustraĵoj meritas esti en la biblioteko de ĉiu esperantisto. — En la sama artikolo oni parolas pri la mizero en Magiaro kaj Ĉeĥoslovakio, rekomendante akcepti gaste kelkajn magiarajn eĉ bohemiajn esperantistojn dum la sermemonato kaj havigi al ili ankaŭ la vojaĝkostojn (po 2000 markoj). Ni ne scias, ĉu tiu ĉi humaneca plano efektiviĝos, sed jam per sia ideo ĝi montras la kortuŝan bonkorecon de la finnaj samideanoj kaj eĉ la fakton, ke la Finnoj estas la veraj amikoj de Bohemoj. Tial ni plifortigi la amikajn ligojn almenaŭ per pli bona konatiĝo, se la malbona ekonomia situacio malhelpas al ni uzi eĉ vojojn aliajn.

El Mcravic. Dum la du unuaj semajnoj de majo partadis en 8 moraviaj urboj (Bystrice, Vyškov, Brno, Prostějov, Olomouc, Holešov, Kroměříž kaj Val. Meziříčí) nia samideano V. Cimr, kiu revenis post ses jaroj el Hispanio, pri siaj spertoj kun Esp. en fremdlando kaj kiel ĝi helpis al li. So. Cimr estas amiko de so. Kühnl, kiu dank al Esp. fariĝis direktoro de l'konsulejo en Madrid. Liaj paroladoj estis interesaj kaj tre utilaj al nia movado. A. J.

Esperanto en burĝaj lernejoj de Praha. En unu kunsido de la reprezentaro de Praha (la 8a de aprilo 1920) ĝia membro germana social-demokrato dro Raŭdnitz, profesoro de universitato, prezentis (ĉefo) proponon, ke oni enkonduku la instruadon pri esperanto en ĉiujn burĝajn lernejojn de Praha komencante de la venonta lerneja jaro kaj ke oni faru tuj ĉiujn necesajn preparojn. La propono estis apude akceptita kaj transdonita al la urbestro por efektiviĝi ĝin. Ni esperas, ke la ŝatinda iniciato de prof. dr. Raŭdnitz (kiu ne estas esperantisto) ne trovos malhelpojn en sia realigo kaj ke ni havos la ĝojon anonci baldaŭ la komencon de la instruado. bh.

La kongreso de militintoj, okazinta en Genevo sub la prezido de la fama franca verkisto Henry Barbusse, akceptis programon de kelkaj rimedoj por amikigi la naciojn. Kiel ĉefan punkton de tiuj rimedoj ĝi decidis postuli la devigan instruadon de Esp. en publikaj lernejoj de ĉiuj landoj kaj disvatigi ĝian uzadon en ĉiuj internaciaj rilatoj. La kongreso decidis, ke post la 1. oktobro 1920 Esp. estos la deviga oficiala lingvo de la ĵus fondita »Internacia federacio de militintoj.«

En Brazilio Esperanto estas instruata en pli granda parto de la duagrada lernejoj.

La foiroj. En Reichenberg, grava punkto de la bohema industrio okazos 14.—22. aŭgusto granda internacia foiro de komercaĵoj kaj specimenoj. La foiro estas Esperantia entreprenco. La mondkonataj industriaj entreprenoj de Ĉeĥoslovakio estos tie reprezentataj. Informojn donas: Reichenberger Messe, Reichenberg, Ĉeĥoslovakio. — En Padova, Italio, okazos Internacia specimena foiro 1.—15. d. Junio. Informojn petu ĉe la oficejo: Palazzo della Camera di Commercio, Padova, Italio. — En Frankfurt a. M., Germanio, okazos la internacia Import-Foiro 2.—11. Majo. — En Helsinko (Helsingfors), Finnlando, okazos internacia foiro 27.—VI.—6.—VII. Ĉiuj pli gravaj Finnlandaj industriaj firmoj tie partoprenos. Ĝis nun oni tie mendis pli ol 10.000 m² da areo. — La nomitaj foiroj uzas oficiale Esperanton.

Esperanto en la komerc^o. La komerca gazeto »Cordoba Comercial« anoncas sur sia titolpaĝo, ke la komerca korporacio, kiu ĝin eldonas korespondas preferencas per Esperanto. — La Komercal ĉambroj en Marseille (Francio) kaj Huesca (Hispanio) aranĝas eketon per Esp. — Stutgarta komercejo (Handelshof) uzas Esp. — En Japanio estas fondita »Japana Esperanta Komercal Korporacio«, kun ĉefoficejo en Jokohama (str. Jumaŝitaĉo 70 c.) kaj filioj en Tokio, Shizuoka kaj Kanazua. Prezidanto de tiu entrepreno estas ing. Takabaŝi, del. de U. E. A. La entrepreno enportos kaj eksportos ĉiujn komercaĵojn. — La gazet »Portugal Comercial e Industrial« en Lisboa (Portugalio) havas esp. fakon. — Esperantistoj de Krakow intencas fondi Esp. eldonan societeton kun kapitalo 50.000 M. dividita en 2000 akcioj po 25 M. — La »Musée Commercial Universel« en Paris (rue de Charlot) 3) starigis esp. sektion titolitan »Universala Komercal Muzeo. Internacia komercal oficejo. — Per reklami la Finnlandan foiron oni eldonis cent diversajn poŝtkartojn kun tekstoj finna, sveda kaj esp. Ankaŭ sigelmorkojn oni eldonis kun teksto de la samaj tri lingvoj. Ĉe la foiro estos ankaŭ gvidantaj parolantaj esp.

Niaj kongresoj. La IX. Belga kongreso de Esp. okazos en Bruselo 23.—25. majo. Informojn donas f-ino. Jennen, 39, rue d'Albanie, Bruxelles. — Esperanto-tago okazos la 16. majon en Budapeŝt. Inf. donas: Dro. Kalocsay, VIII., Josef u. 4. — I. Diskuta kunveno de Esperantistoj de Iberiaj landoj okazos en Barcelono 27.—30. junio. La kunveno havos fakojn: kuracista, jurista, laborista kaj ekspozicia. Por la ekspozicio oni petas sendi ka-

talagojn, gvidlibrojn, poŝtkartojn k. t. p. laŭ la adreso: Esp. societo Paco kaj Amo, Asturias 1, Barcelona. — La II. kongreso de britaj esp. okazos 21.—25. majo en Birmingham. Adr.: So. Cecil C. Goldsmith, 92, Douglas Road, Acocks Green Birmingham, Anglio.

Konsideru, ke por la presado de La Progreso oni jam pagas pli ol ses foje pli multe, ol oni pagis dum la unua jaro de ĝia ekzisto. Kaj la kosto de La Progreso ne triobliĝis...

Samideanoj helpu!

La soc.-dem. junularo en Plzeň en mon. julio aranĝos ekspozicion en la II. reala lernejo, kiu konsistos el 18 fakoj. La ekspozicion partoprenos ankaŭ la Laborista soc. esp., kiu ricevos por tiu celo la plej grandan halon. Ni petas afablan helpon de niaj bonvolaj samideanoj kaj esp. societoj, kiuj per siaj kolektoj povus pliriĉigi la esp. fakon. Samideanoj de la tuta mondo, helpu! Sendu al ni prunte: esp. afiŝojn, gvidfoliojn, gvidlibrojn, fotografadojn, flugfoliojn, librojn k. t. p. kaj ni redonos al vi ĉion rekomendite en ĝena ordo. La elmetitajn objektojn ni signos per la mono de la posedanto. — En la pasinta jaro nia societo aranĝis esp. ekspozicion en Doudlevice ap. Plzeň, kiu vizitis eĉ ministro por instruado kaj nacia kulturo so. Hebrman kaj la urbestro de Plzeň so. L. Pík, kiu mem esprimis la deziron aranĝi la esp. ekspozicion en Plzeň. Do, ni komencas la propagandon en la metropolo de bohemia okcidento petante helpon de ĉiu nia amiko. — Samideano Jos. Pech, prezid. de Laborista soc. esperantista, Plzeň, Houškova 4.

KRONIKO

Praha. En la ĝen. kunveno de la Esp. Klubo, okazinta la 19. de aprilo estis elektitaj: prezid. Jos. Eiselt, em. gimnazidirekt., vicprez.: V. Kraus, oficestro, sekretario: Aug. Pitlík, komercministeria komisario, kasisto: Fr. Novák, komitatanoj: red. Weiner, Waldstein, Ginz, Danda, anstataŭantoj: f-inoj. Weiglová, Vlčková, s-c. Bohutínský, revizoroj: prof. Stejskal, rev. Vondruška, anstat.: Poustka. — Inter la liberaj proponoj oni preparolis la enkondukon de Esp. en lernejojn kaj komercajn rondojn. La amajn interrilatojn kun la alinaciaj esp. de Ĉeĥoslovakio kaj la programon por la somera sezono. Per samideano Bakalář-Srbecký oni kolektis 117.— Kĉ. Korespondajon por la Klubo oni adresu al: S-o. A. Pitlík, Praha III., Nerudova 40. — En la membraj kunvenoj de la Esp. Klubo estis aranĝitaj jenaj paroladoj: 30. IV. sekret. Pitlík: »Mia eŭropa paroladvojaĝo«, 7. V. la sama: »Ilago — kongresurbo kaj Nederlando« kaj U. E. A. — del. Kraus: »U. E. A. kaj Hector Hodler«.

Plzeň. En la I. komercal lernejo oni enkondukis Esp. Instruas tie so. instr. Balvín.

Plzeň. Laborista soc. esp. aranĝas du kursojn en la »Popola lernejo«: posttagmeze 4—5 h. por lernantoj el ĉirkaŭaĵo, kiuj vespere forveturas per vagonaro, vespere de 8—9 h. por la lokaj lernantoj. La kursojn partoprenas 68 personoj. Instruas so. Pech.

Ĉrást ap. Plzeň. Soc. dem. societo aranĝas

kurson por 26 personoj. Instruas so. Pech. La aranĝinto estas so. F. Kraus.

Krašovice ap. Kazňov. Labor. gimnast. unuigo aranĝas kurson por 23 personoj. Instruas so. F. Pašek. Propagandan paroladon faris tie ĉi so. Pech el Plzeň.

Brno. Esp. tie ĉi tre bone progresas. Lokaj gazetoj alportas ofte artikolojn pri nia movado kaj pri E. («Lidové Noviny» de franca legiano Mráz, «Socialistická Budoucnost» de profes. Kroužil «Moravská Orlice» de Straka, «Republikán» de Grim. Krom tio ankaŭ «Občanské Noviny» a «Svoboda».) Dum la lasta kurshoro la 4. majon paroladis so. Cimr, oficisto de ĉs. konsulejoj en Madrid, «Kiel al mi Esp. helpis dum miaj vojaĝoj». Oni preparas esp. ekspozicion ĉe librovendisto Barvič. En Brno estas tre bona kampo por E., sed mankas pli multaj organizantoj.

Val. Meziříčí. Kurso de Esp. por instruistinoj estas vizitata kun granda intereso. Instruas f-ino. Janalíková el Bystrice p. II.

Bystrice p. H. Oni gvidas du kursojn: por komencantoj kaj por progresintoj.

Mor. Ostrava. En ĉi tiu regiono rapide kreskas la intereso por nia movado. Fondiĝis grupo en Přívoz, Vítkovice kaj Paskov. Oni aranĝos tie ĉi propagandajn paroladojn de f-ino. Janalíková.

Mähr. Schönberg. La 16. apr. paroladis so. H. Tutsch pri la nuna stato de Esp. movado. La 16. la sama so. komencis kurson por 17 partoprenantoj. La partoprenintoj de la antaŭa kurso kunvenas ĉiuvendrede.

Užhorod-Ungvár. La 25. apr. fondiĝis grupo kun preskaŭ 50 membroj. Prezidanto estas so. Alex. Spire. Kurso komenciĝis. Adreso de la grupo: Esperanto-Spire, Užhorod.

BIBLIOGRAFIO

V. G. Avsejenko: **Fraĝlino Suzano**, novelo trad. el la rusa lingvo de P. Medem, eldonita ĉe Ader kaj Borel G. m. b. H., Dresden-A. Prezo M 1.50 kun 10% plikarigo. La broŝuro havas 64 paĝojn 188×123 mm. — Ĉiu, kiu tragelos ĉi tiun libron konsentos kun ni, ke nia literaturo estis per ĝi valore riĉigita. Al la amantoj de bela prozo ni ĝin varme rekomendas, ne nur pro la interesa historio kiun ĝi priskribas, sed eĉ pro ĝia bonega esp. stilo.

Charles G. Stuart-Menteth: **Angla kaj Esperanta etimologio**, eldonita ĉe British Esperanto-Association, London W. C. 1., 17, Hart Street. Prezo ne montrita, paĝoj 18 en formato 185×125 cm. — Jen broŝuro enhavanta etimologiajn komparojn en esp. kaj angla lingvoj kun la celo pruvi la naturecon kaj internaciecon de Esperanto. La libreton ni povas rekomendi speciale al la instruistoj de Esp. kaj al ĉiu, kiu okupas sin per funda studo de fremdaj lingvoj.

Lingva instruado (laŭ Thora Goldschmidt) sur la fundamento de bildotabuloj: **Bildotabuloj por la instruado de Esperanto**, aplikita al Esp. de prof. Dr. Joh. Dietterle, direktoro de la Ŝtata Esp. Instituto en Leipzig. Bele bildita libro 104 paĝa en formato 260×200 mm. Prezo: M 6.40. — Jam de kelkaj jar-

dekoj estas konate, ke la instruado de la lingvoj bazanta sur perceptoj okulaj gvidas al plej bonaj eĉ plej rapidaj rezultatoj ĉar la lernando konceptas la al li prezentitan materialon ne nur per sia imago, sed direkte per siaj okuloj. Kaj sur tiu ĉi ekono bazas kelkaj instruaj metodoj, inter kiuj vicigas ankaŭ tiu de Thora Goldschmidt. La konata firmo Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig eldonis jam diverslingvajn librojn laŭ la nomita metodo kaj ni ĝojas, ke ĝi nun surprizis nin per la eldono esperanta. Ĉi tiun libron ni varme rekomendas por la uzado en kursoj progresintaj, sed ni ne dubas, ke ĝi povas esti uzata jam en la kursoj elementaj, kiam la lernantoj estas konatiĝintaj kun la reguloj gramatikaj.

Kvar infanaj kantoj (Four Songs for Children). Esperantaj versoj de J. D. Applebaum, angla traduko kaj muziko por piano kaj voĉo de Charles B. Mabon. Prezo: 1 ŝilingo 2 pencej afrankite. Ricevebla ĉe British Esp. Association, London, W. C. 1., 17, Hart Street. — La verkaĵo de Applebaum-Mabon valore pliriĉigas nian originalan kantanon kaj ni ĝin varme rekomendas al ĉiu kanto- kaj muzikamanto. La melodioj estas jen facilaj kaj harmoniaj kaj koncerne la versojn ni ne povas diri, ĉu la esperanta originalo aŭ la angla traduko estas pli belaj. — Ĉi tiu verkaĵo estas mendebla pere de nia redakcio.

La libro de komuna preĝo. Kajero unua. Eldonita de la Eklezia Esperantista Ligo (Farnley Tyas Vicarage, Huddersfield, Anglio). Prezo: 8½ pencej. Paĝoj 24, 19×13 cm. Enhavo de la preĝaro: La ordo de la matena preĝo. La ordo de vespera preĝo. Ĉe matena preĝo. La litanio.

Bohemlingvaj verkaĵoj: Julie Šupichová: **Uĉte se Esperantu!** Vydal kroužek Esperantistek v Praze. Broŝureto 12 paĝa 12×10 cm. (Vidu la anoncon en la anonparto!) La verketo priskribas en maniero tre konvinkiga la gravecon de la lingvo internacia kaj de Esperanto en diversaj fakoj de la homa agado kaj la nunan disvastigon de nia movado. — La bohemiaj propagandistoj ne forgesu disvatigi amase ĉi tiun tre taŭgan propagandilon! —

Volné sdružení klasů. Sběrka lidovýchových pouček přednesených v pravidelných týdenních obdobích na Staroměstském náměstí v Praze. Vydává Dr. Alex. Batěk, Břevnov u Prahy. Cena spisku 40 hal. — 1 Kč. Dosud vyšlo: Jsme šťastní dědicové, Desatero mravní, Odrakouštit a převychovat, Žena a její osvobození, Jak máme jísti, Chamtivost přičinou národní mizerie, Bez ideálu nelze žít, Cokoli konáš, konej řádně, Sto jisker ethických, Neplýtejte národním jménem, Jak zvýšiti naši valutu a m. j. — Náš vzácný a milý přítel prof. dr. Alex. Batěk obral si za životní svůj úkol vychovávat a poučovat náš lid a vésti ho cestou dobra a pravdy. Ke svým populárním dílkům vědeckým, jichž vydal již před válkou řadu obrovskou, připojuje teď sbírku mravně-vychovávaci snaze se ozdraviti naše bědné poměry. Kdo z nás nechtěl by ho v jeho snáhách podporovati, kdo by nechtěl se státi jeho pomocníkem? Objednávejte jeho knížечky a širte je v okruhu svých známých. Tak nejlépe prospějete vlastní i dobru.

Bratislavská pošta, vzdělavací a zábavný časopis obrázkový. Vychází jako čtrnáctidenník v Bratislavě, Kopáčská ul. 25. Předplatné na 20 čísel Kč 10.—. Psán slovensky. — Časopis, který svým velmi sympatickým obsahem získá srdce všech Čechů, kteří milují Slovensko a naše tak dlouho nešťastné bratry Slováky. Kolik idealismu, kolik poctivé snahy prospět tomu drahému lidu vane z jeho řádků! Vřele doporučujeme!

Die Welthilfssprache, Flugblätter zur Förderung und Verbreitung des Esperanto im deutschen Sprachgebiet. Herausgegeben von der Deutschen Esperanto-Zentrale, Dresden A. 1. Bis jetzt sind ersch.: Was ist Esp.? Wer soll Esp. lernen? Esp. und die Zukunft. Esp. auf einem Blatt. Preis: 100 St. M. 2.50. — Die Sprachen im neuen Europa und das Esp. Kurzgefasste Esp.-Sprachlehre. P.: 100 St. M. 5.—. — Der Ballast der Sprachen und das Esp. (Sehr geeignet für Schulkreise.) Pr.: 1000 St. 2.50. — Das »Common Commercial Language Committee« in London. Ein Beitrag zur amtlichen Förderung der Welthandelsbestrebungen. Pr.: 100 St. M. 4.—. La flugfoliojn ni rekomendas al niaj propagandistoj sciantaj la germanan lingvon.

Novaj gazetoj. La esperantista socialista movado estas fortigita per du novaj esp. gazetoj, kiuj ambaŭ meritas subtenon de niaj samideanoj-socialistoj:

Esperantista Laboristo, sindikalista, liberecana internaciista. Redaktoro: E. Adam, 24. Blvd. Beaumarchais, Paris. Admin.: L. Glodeau, 177, r. de Bagnolet, Paris Jara abonprezo F. 5.50, kune kun la »Travailleur Esperantiste« Fr. 7.50. — Teksto nur esperanta.

Laboro, monata organo de »Portugala laborista Esperanto-Federacio«. Redaktoro: A. P. da Costa Jr. Adreso de la redakcio kaj admin.: T. da Agua de Flor, 33, — Lisboa. Portugalio. Internacia abonprezo jare Fr. 3.50 aŭ 14 respondkuponoj. — Tekstoj esp. kaj portugala.

ooo

DEZIRAS KORESPONDI.

(La enpresio kostas Kč. 1.—.)

Něm. Brno (Ĉeĥoslovakio). So. George Kraus, ĉe so. direktoro Racek, interŝanĝas pm. kaj il. poŝtk. kun fremdlandaj studentoj kaj skoltoj.

Vranov. Zemplinskaja župa (Ĉeĥoslovakio). So. Zoltano Sugár deziras korespondi kun ĉiulandaj esp. per il. poŝtk. Li ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn. Li ĉiam tuj respondos!

Esperantistoj! Sendu Vian adreson al so. L. Schubert en Slaný (Ĉeĥoslovakio). Li be-

zonas ilin por siaj kolegoj. Al ĉiu oni respondos. —

Jaroměř n. L., 284 (Ĉeĥoslovakio). Stefano Nachbauer (Pl. bdf. ĉiam tuj respondos.)

Plzeň V. (Ĉeĥoslovakio). So. Jan Příbáh deziras serioze korespondi kun alilandanoj per leteroj kaj il. p.

Wiipurij Neitsyliniemi Matinkatu 6. (Finland). So. Lauri Salmi, interŝanĝas fotografojn, esp. »ŝlosilojn« kaj gazetojn.

Humppila Murto (Finlando). So. Elias Syrjanen sendos al vi por 50—500 vialandaj poŝtmarkoj la saman kvanton kaj valoron finnaj kaj estonaj poŝtmarkoj Provu ĉiuj! — Katalogon senpage.

Drahenice apud Březnice. (Bohemio) Božena Doneková deziras korespondadi kun ĉiulandaj esp-istoj pri interesaj temoj.

Zábřeh, Moravio. S-o. Bittner Jan deziras interŝanĝi vidajkartojn, markojn bildflanke.

Postřelmuvek apud Zábřeh. S-o. Bittner Jan deziras interŝanĝi vidajkartojn, markojn bl.

Fervora esperantisto s-o. J. J. Sussmuth teksta fabrikisto en Usono vizitos en monato aŭgusto k. j. centran eŭropon kaj volonte farus paroladon pri esperanto kaj komerco ĉe tiuj esper. kluboj, kiuj interesigas je tiuj temoj; societoj kaj kluboj kiuj dezirus aranĝi paroladon turnu sin al f-ino A. Vamberová, Pardubice, Svatojánská 681.

P. Schuster Josef, učitel v Chebu, Ringstr. 31, žádá o sdělení adresy, příp. o stanovení nabídky na letní byt po čas prázdnin, kde by mohl s úspěchem se zdokonaliti v českém jazyku; administrace sama prosí Esper. o doporučení.

Vešk. informace o Esperantu

přináší brožurka J. ŠUPICHOVÉ, kterou vydal „Kroužek esperantistek“ v Praze:

Učte se Esperantu

Cena 1 výtisku poštou 60 h, při větší objednávce sleva. Objednávky vyřizuje sekretářka Kroužku sl. Sidonie Dlouhá v Praze, Wilsonovo nádraží

Dopisnice s obrazem presidenta

T. G. MASARYKA

vydala admin. „La Progreso“

kus 30 hal., 10 kusů 270 Kč, 100 kusů 24.— Kč

Objednejte si slovník Esperantsko-český

u adm. „LA PROGRESO“ v Plzni.

Cena brož. Kč 4.—, v plátně váz. Kč 7.—.

„LA PROGRESO“

en la nuna jaro kostas 12.— Kč aŭ 2.— Svisajn Frankojn.

La fremdlandanoj abonon ĉe la „Universala Esperanto-Asocio“, Bern, Museumstr. 14.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittel, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.